

Protokolo de la estrara skajpkunsido, 2 marto 2011

Ĉeestis: Estraranoj Duncan Charters, Stefan MacGill, Zsófia Kóródy, Julija Batrakova kaj (nur skribe) Radojica Petrović.

1. Verkontoj de enkondukoj por IPR

2011/2 Rade (konferencaj+simpoziaj preparoj); 2011/3 Duncan (konferencaj rezultoj), 2011/4 Zsófia, (evoluo en Herzberg kaj/aŭ ekzamenoj).

2. Sekretaria adreso

Konsentite anonci novan laŭofican retadreson; intertempe pli ol unu persono plenumos la taskojn. La fizika adreso estu ĉe ICH, kie okazos la taskdividado. Necesas zorge plani tiun dividon, inkluzive de decidoj kiu respondu ricevitaĵajn petojn kaj demandojn.

3. Juna amiko

La ekfunkciado de la nova administranto bone progresas. Alvenis propono dividi la anoncadon de afrikaj abonoj inter du instancoj. Stefan sekvas la proponon. Gravas pretigi buĝeton por JA por 2011.



4. Interna Regularo – principaj demandoj

- Ŝanĝu la terminon ‘Estraro’ al ‘Liverteamo’ (bezonus Statut-ŝanĝon). [Malakceptita](#).
- Modifu difinon de ‘Individuaj membroj’: Ĉiuj kiuj ne aliĝas tra sekcio. [Akceptita](#), sed kun regulara deklaro, ke la kutima vojo al membriĝo estas tra sekcio se ekzistas.
- Forigu la rajton de individuaj membroj nomi komitatanojn (neniam reale okazis). [Akceptita](#).
- Konfirmu pri modifo de la membro-postuloj por ekesti sekciestro, reprezentanto. Akceptitaj en 2006 kaj 2009. Komitato nun voĉdonas. [Akceptita](#).
- Definitiva forfaligo de la alineo pri rotacia elekto de estraranoj (proponita 2001, efektivigita en la konferenco de 2003). [Akceptita](#).

Tiuj decidoj malfermas la vojon finredakti la jam malnete verkitan serion de ŝanĝproponoj. Tiujn la estraro definitivigu en sia kunsido 16-18 aprilo, por ke la komitato ekde tiu tempo ricevu kaj diskutu la proponojn.

5. Regularo pri Honoraj Membroj

Konsentita proponi al la komitato malgrandan modifon de la regularo de HM por permesi honorigon de forpasintoj, laŭ teksto sendita 1 mar, 2011. Propono starigi tempolimon por tio restas pripensenda, diskutenda.

6. Kontaktpersonoj

Konsentita la kategorio ‘kontakt-persono’. Tio helpas al ILEI ekagi en novaj landoj.

7. Laulanda statistiko por 2010

Proponata stato kun 755 membroj sendita 1 mar; Julija transkontrolos kontraŭ financaj fontoj; post konsento, la datumoj por 2009 kaj 2010 aperos en nia retejo.

8. Konferenco

Aliĝoj atingis 36. La limdato por la nunaj prezoj estas la 31a de marto, 2011. Konsentite aperi en nia retejo la liston de aliĝintoj (sen adresoj). Pri posta aperigo, necesas memori ke la aliĝilo petis permeson aperi adresojn, kaj kelkaj personoj malkonsentis pri tio. Necesas firmigi la planojn pri la redaktado de la konferenca libro.

Protokolis: SMG.

Okazis plie en Budapeŝto en la sama tago 50-minuta fizika kunsido inter Stefan, Zsofia kaj nova kunlaboranto de ICH, kiu laŭplane povos plenumi taskojn ankaŭ por ILEI. Plia kunsido okazos en la 3a de marto, ĉefe por esplori eblojn por la plurlingva retejo.

Ni diskutis manierojn efikigi la membro-administradon, la disdividon de sekretariaj kaj aliaj taskoj; ni fiksas manierojn movi stokojn de nia nova varbilo, por ke ĝi pli intense estu distribuata. Ni studis eblojn ricevi nian stokon de *Detala Gramatiko de Esperanto*, kaj pri la partopreno de ILEI en la german-nederlanda kongreso en junio.

Decidite, ke la retmembrojn administros intertempe la prezidanto, sed la plena membro-registrado okazos en aŭgusto de Herzberg. La prezidanto kompilos la estraran jarraporton, sed la raportoj pri Landaj Sekcioj estos kompilitaj en Herzberg. Aliaj taskoj estos delegitaj inter kunlaborantoj en Budapeshto.

====fino==== SMG: 3 mar, 2011. Iris al la estraro tiutage, nun al la retejo 7 marto, 2011.